


# Eŭropa Bulteno

Majo 2012, Numero 116



## LA PREZIDANTO INVITAS VIN AL GALIVO

Karaj eŭropaj gesamideanoj,

Elkore mi ŝatus inviti vin ĉiujn al la 9a EEU-Kongreso en Irlando, inter la 16-a kaj 20a de julio, kies temo estos “Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli”, kaj kiu celas konatigi la lernfaciligajn ecojn de Esperanto. Malfermos la kongreson la irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton, kaj la alta protektanto estas la prezidanto de Irlando, Michael D. Higgins. Via ĉeesto en Irlando estos valora subteno al la agado de EEU (por detaloj, rigardu [www.europo.eu](http://www.europo.eu)).

VENU VIDI LA ESTONTON DE VIA LINGVO!: pro la senĉesa uzado, kaj pli kaj plia dominado, de la angla lingvo en ĉiuj eŭropaj landoj, eble interesus vin vidi la finan etapon de tiu proceso. Mia lando Irlando havis jam en la 12-a jarcento la sperton de koloniado far najbara lando. Jam en la 14-a jarcento, en 1366, ni ricevis leĝojn kontraŭ la irlanda lingvo, la tiel nomatajn “Statutojn de Kilkenny” (irlande ‘Cill Chainnigh’), kiuj rekte malpermesis al la angla kolonio Irlando uzi la irlandan, kaj ordonis ke “ĉiu anglo en Irlando devas lerni la anglan lingvon. Se li rifuzos, li estos traktata kiel irlanda malamiko”. Ĝis la mezo de la 19-a jarcento la irlanda, lingvo kun 14 jarcentoj de skriba literaturo, ekde AD 597, restis la lingvo de la plimulto. Sed antaŭ la fino de la 19-a jarcento okazis tiom radikala kaj subita

lingvoŝanĝo ke en 1893, nur 3% ankoraŭ parolis irlande hejme. Pliaj detaloj pri la historio de la irlanda lingvo ĉe <http://www.tg4.ie/ie/tg4-player/tg4-player.html>. Pro la sendepenceco en 1922 Irlando ne tute perdis sian lingvon, sed se vi venos al Irlando por partopreni en nia 9-a EEU-Kongreso, vi mem spertos la nunan situacion. Imagu ke via lingvo, la franca/germana/hispana/pola/slovena, estus en la nuna pozicio de la irlanda! Mi forte esperas ke tio ne estos la estonto de la aliaj eŭropaj lingvoj, sed bedaŭrinde ĉio nuntempe ŝajnas iri ĝuste tiudirekten.

Sed ĉio ne estas ankoraŭ perdita. Lastatempe EEU pli kaj pli sukcesis interesigi ne-esperantistojn por Esperanto. Mi ŝatus mallonge mencii tri ekzemplojn.

1) EEU aktive partoprenas la EU-Civilsocian Platformon por Multlingvismo – ĝia raporto, nun en la oficiala retejo de la EU-Komisiono, entenas 75 referencojn al Esperanto, ĉiujn pozitivajn ([ec.europa.eu/languages/pdf/civilsocplrapport-full-version\\_en.pdf](http://ec.europa.eu/languages/pdf/civilsocplrapport-full-version_en.pdf)). Tiukadre, mi dum 10-minuta intervjuo havis okazon klarigi la eblan kontribuon de Esperanto al eŭropa multlingvismo ([www.youtube.com/watch?v=EgqKAQMuzPI](http://www.youtube.com/watch?v=EgqKAQMuzPI)). La Platformo daŭre laboras – ĝia venonta kunveno okazos en Bruselo la 29-an de junio.

2) Inter la 9-a kaj 11-a de majo 2012, EEU organizis tre sukcesan konferencon pri Eŭropo en Triesto. Prelegis la antaŭaj prezidantoj de Kroatio kaj Slovenio, la antaŭa itala ministro pri eksteraj aferoj, kaj pluraj eŭropaj kaj italaj parlamentanoj. La laborlingvoj estis Esperanto, la itala kaj la angla, kaj ĉeestis 70 studentoj de ĵurnalismo el 6 EU-landoj, kun siaj profesoroj

3) Aprile 2012 EEU sendis proponon al la EU-Komisiono, kadre de la nova civitana iniciato kun la celo arigi 1 milionon da subskriboj en la 27 EU-landoj, por rekomendi la kantadon de la eŭropa himno en Esperanto, laŭ la vortoj de Umberto Broccatelli (gazetara informo:

<http://www.europo.eu/eo/civitana-iniciato>).



Praktike: eblas flugi el multaj eŭropaj landoj al Dublino, kaj vojaĝi aŭtobuse rekte de la flughaveno al Galivo dum 2 horoj. Estas interesaj antaŭ- kaj postkongresoj, vidu <http://eeu-kongreso.webnode.com/>.

Amike kaj samideane via.

Seán Ó Riain

## EŬROPA KONFERENCO EN TRIESTO PRI EU KAJ LA PACO

Inter la 9-a kaj 11-a de majo okazis en Triesto 3-taga konferenco organizita de Eŭropa Esperanto-Unio kun loka partnero Triesta Esperantista Asocio »Kia estus Europano nun, sen EU?«. La konferenco okazis dank' al financa subteno de Eŭropa Komisiono el fondaĵo Eŭropo por Civitanoj (Europe for Citizens). En ĝi rolis tri laborlingvoj: Esperanto, la itala kaj la angla kun samtempa interpretado de kaj al ĉiuj tri kaj kelkfoje aldone al pliaj du lingvoj (la kroata kaj la slovena). Partoprenis 140 personoj el 12 europaj landoj kaj en la programo partoprenis du eksaj ŝtatestroj (Stjepan Mesić el Kroatio kaj Milan Kučan el Slovenio), unu eksa ministro de eksteraj aferoj (Gianni De Michelis el Italio), eksa Eŭropa parlamentano Giorgio Rossetti (italo), nuna Eŭropa parlamentano Antonio Cancian (italo), eksa ĝenerala sekretario de Eŭropa Popola Partio Thomas Jansen, pluraj universitataj profesoroj inter kiuj Francois Grin el Genevo kaj kelkaj fakuloj.



Krome okazis ronda tablo por ĝenerala publiko kun partopreno de Kučan, Mesić, De Michelis kaj Thomas Jansen pri la rolo de EU rilate la konservon de paco en la mondo. Ne malgrave estas menciit ke fine de la solena malfermo Eŭropan himnon laŭ la teksto de Umberto Broccatelli kantis en Esperanto sopranino Ingrid Jellenz. Pri la aranĝo aperis deko da artikoloj en italaj kaj slovenaj gazetoj, deko da televidaj elsendoj kaj intervjuoj. Kadre de la konferenco okazis (ĉar duono de la publiko estis studentoj pri ĵurnalismo el 6 universitatoj de 5 landoj) laborejoj por studentoj gvidataj de la priĵurnalismaj profesoroj el Zagreba kaj Zadara universitatoj (Gordana Vilović kaj Stjepan Malović). Triesta Esperantista Asocio gvidata de Edvige Ackerman atingis ankoraŭ la jenon:



- 1) La konferencon aŭspiciis: Ministro por Eŭropaj Aferoj de Italio, Enzo Moavero Milanese
- 2) Triesta E-Asocio ricevis pro la aranĝo reprezentan Premion de la Prezidanto de la Itala Respubliko Giorgio Napolitano
- 3) Finance subtenis la konferencon ankaŭ Aŭtonomia Regiono Friulo Julia Venetio
- 4) Diversmaniere helpis kaj subtenis Komunumo de Triesto, Universitato por Studoj de Triesto kaj UNESKO Centro de Triesto.



Kaj jen iom pri la ekesto de tiu ĉi nekutima aranĝo en kiu esperantistoj estas nur organizantoj kaj Esperanto nur unu el la tri laborlingvoj. Siatempe dum iu ekskurso oni diskutis kial multaj intelektuloj en Kroatio malakceptas la ideon pri eniro al Eŭropa Unio, kial ili ne komprenas la simplan fakton, ke malgraŭ ĉio estas unu esence grava rolo, kiun EU jam pruvis, ke pro ĝia ekzisto en Eŭropo jam regas 67 jarojn paco (escepte de Jugoslavia milito) kaj ĝuste la eksjugoslaviaj ŝtatoj devus tion multe pli bone kompreni ol aliaj. Tiam venis al mi ideo pri neceso organizi konferencon kiu inversigos la demandon: Ne: Kial EU estas bona?, sed Kiel estus nun, se EU neniam estus formita? Kune kun mia filino Maja, kiu aldonis la ideon ke la celpubliko devus esti junaj ĵurnalistoj, ĉar ili ja devus pluporti la torĉon de tiu konscio, ni ellaboris projekton por Eŭropo por Civitanoj. Unue EEU kontaktis Hamburgan E-societon por esti loka partnero kaj organizi la konferencon, sed la projekton tiam EU-fondaĵo malakceptis. La Hamburganoj ne plu volis provi la sekvan jaron kaj ni trovis partneron en Triesto. Ni ankaŭ priskribis pli detale kaj pli konvinke la projekton kaj reproponis ĝin al la sama EU-fondaĵo por Eŭropaj Civitanoj. Kaj ĉi-foje ĝi estis akceptita ricevinte subvencion de 45.000 eŭroj (por la konferenco mem 35.000). La tuta projekto (preparo de la konferenco, okazigo kaj postaj raportoj, aperigo de libro kaj pritaksokunvenoj) daŭras de la 1-a de septembro 2011 ĝis la 1-a de marto 2013.

Jam en la projekto ni antaŭvidis partoprenon de la du eksaj ŝtatsprezidantoj kaj kelkaj aliaj politikistoj. Ŝajnis al ni la temo sufiĉe alloga, ke ni povas peti ilian partoprenon. Pro la UK en Zagrebo kiam la tiama ŝtatsprezidanto de Kroatio jam havis rilatojn al Esperanto, ni supozis ke li akceptos kaj pro kelkaj kontaktoj kiujn mi havis kun la slovena eksa ŝtatsprezidanto ni

kredis ke ankaŭ li akceptos. Kaj tiel okazis. Ne estis problemo ricevi subtenon ankaŭ de historiistoj kaj ekonomikistoj kaj feliĉe la Triesta partnero havis same aktivan rilaton al la ekstera mondo kaj senprobleme kontaktis italajn politikajn kaj administrajn aŭtoritatojn kaj politikistojn kaj tiel akiris ankaŭ gravajn personecojn de la itala kaj eŭropa politiko.



Pravas nia EEU-prezidanto, Sean O Riain, kiu deklaris post la konferenco: »La brila sukceso de la triesta konferenco estas pruvo, ke ne-esperantistoj ekinteresiĝas pri Esperanto kiam ni faras ion por kunlabori kun ili kaj, antaŭ ĉio, por helpi antaŭenigi iliajn celojn, kiel paco en Eŭropo tra la eŭropa integriĝo, kiuj fakte tute kongruas kun la celoj de Esperanto. Ni lernu el tio.«

Kiel mi diris en la fermo de la konferenco, estas 4 faktoroj kiuj sukcesigis tiaspecan konferencon:

- 1) ke ni (EEU) disponis pri kapabla teamo (inkluzive de Triesta E-Asocio), kiu baze de sperto kaj profesia laboro sciis inventi la ĝustan kaj allogan projekton, kiun EU-instancoj pretis financi,
- 2) ke la E-Movado evoluis sufiĉe, ke tiaj eminentuloj konis ĝin kaj pretis akcepti nian inviton partopreni sciante ke tio ne damaĝos ilin,
- 3) ke la E-Movado havas tiel kvalitajn interpretistojn kiuj kapablas samkvalite plenumi la samtempan interpretadon inter Esperanto kaj pluraj aliaj lingvoj,
- 4) ke EEU havas malpli formalan kaj tre flekseblan, sekve tre efikan strukturon de funkciado de organoj, kiun ne sufokas tro da propra burokratado.

Dum la konferenco okazis 12 prelegoj de gravaj politikistoj kaj fakuloj kiuj el diversaj perspektivoj prilumis diversajn demandojn pri EU kiuj sendube montras ke la nuna Eŭropo ne havas alternativon: ĝi devas plu plibonigadi kaj disvastigadi Eŭropan Union. Ĉiuj prelegantoj – kvankam tio ne estis la temo – laŭdis diversmaniere ankaŭ esperantistojn kaj Esperanton. Eksa ŝtatestro de Kroatio diras en la komenco de sia prelego: »Mi **ne estas esperantisto**, sed mi alparolas vin kiel **geamikojn**, ĉar tio kio estis ĉiam en mia koro: **paco kaj interkompreniĝo inter homoj kaj popoloj**, troviĝas ankaŭ en la fundamento de la ideo

de universala lingvo Esperanto.« Kaj li finas per la jenaj vortoj: »Mi ne dubas pri valoro de EU kaj mi ŝatus ke ankaŭ Esperanto trovu sian lokon en ties institucioj.«

Dum la Ronda Tablo malfermita al ĝenerala publiko, kiun gvidis eksa parlamentano de Eŭropa Parlamento, italo, Giorgio Rossetti kaj kiu daŭris horon kaj duonon, Thomas Jansen, kaj Gianni De Michelis, iama Ministro pri diversaj fakoj de Italio kaj precipe pri Eksterlandaj Aferoj, Milan Kučan kaj Stjepan Mesić respondis al demandoj rilataj al la rolo de EU en konservo de la paco. En tiu diskuto estis klare montrite ke EU sendube estas la ĉefa faktoro kiu povas konservi la pacon en krizaj situacioj kaj ke malapero de EU prezentus katastrofon por Eŭropo kaj eble por la mondo.



Dum la laborejoj de studentoj en kiuj oni ludis similitajn situaciojn (ekz. la studentoj ludis la belgajn politikistojn kiuj debatis kiel kunmeti la registaron, ili ludis la konferencon por ĵurnalistoj en kiu la prezidanto de Eŭropa Tribunalo respondas al la demandoj de ĵurnalistoj rilate la verdikton per kiu la Tribunalo deklaris

ke la postuloj de eŭropaj institucioj enoficigi homojn kiuj scias denasknivele la anglan lingvon ne estas diskriminacia, kaj simile...) aperis tre interesaj opinioj de junuloj, kiujn ni nur analizos kaj pri ili raportos en la postaj monatoj.

Vi povas rigardi belajn fotojn pri la aranĝo ĉe:

<https://plus.google.com/photos/102475826370689061272/albums/5741963753403862481?banner=pwa>

Zlatko Tišljarić

## ĈU DESUBISMO AŬ DESUPRISMO?

Tiu demando reaperas regule dum la jardekoj kiam oni parolas pri informado. Ĉu pli efike konstrui solidan bazon (informante la simplajn civitanojn kaj ilin varbante) aŭ aliri la povregantojn, la opiniformantojn, la kulturajn elitojn, nome tiujn kiuj decidas?

La itala movado ne kapablis elekti kaj, tio estas tre bona... elekto! Pro tio en suda Italio, en Sicilio, en urbo Mazara del Vallo okazadas de unu jaro kursoj por esperantigi la lernantojn de la mezgradaj lernejoj, ankaŭ perspektive al ontsomera nacia kongreso. Imagu la entuziasmon de la kongresanoj: alveni tien kaj esti akceptataj de knaboj, junuloj kiuj alparolas vin surstrate en esperanto!



Sed, kiel mi jam diris, la itala movado ne subtaksas la validecon de la desuprisma aliro al informado. Kaj – tre interese laŭ geografia vidpunkto – tio okazis en Trieste, tute nord-oriente, ĉelime kun Slovenio.



Kiam oni parolas pri Trieste oni celas la Triestan Esperanto-Asocion kun ĉekape s.ino Edvige Tantin Ackermann. Al ili turniĝis Eŭropa Esperanto-Unio por kunorganizi konferencon pri la temo “Kia estus Eŭropo nun, se ne ekzistus Eŭropa Unio?”. Aparte interese estas ke la temo estis elektita pli malpli antaŭ du jaroj, kaj kiom ĝi iĝis aktuala nuntempe! Dum tri tagoj – de la 9.a ĝis la 11.a de majo – kunvenis en Trieste tre interesa

partoprenantaro, tute ne tipa por niaj aranĝoj: krom la kutimaj esperantistoj – kelkaj italoj, kaj EEU-respondeculoj, agantoj kaj simpatiantoj – partoprenis plentempe sesdeko da ne-esperantistaj gejunuloj el Aŭstrio, Kroatio, Slovakio kaj Slovenio, kiuj vizitadas la universitatojn pri ĵurnalismo de tiuj landoj. Kaj tio jam estas iom nekutima. Ili venis, partoprenis – dank’ al la profesieca interpretado inter la oficialaj lingvoj: angla, esperanto, itala de seso da homoj kiuj travivis tiun sperton enfermitaj tuttage en varmaj budoj – kaj poste kunvenis en grupoj por pridiskuti temojn ligitajn kaj al ilia studado kaj al la temoj prezentitaj prelege de la gastoj.



Kaj jen la alia eksterordinareco: la gastoj! Venis, prelegis, restis preskaŭ la tutan tritagan periodon, kafrinkis, vespermanĝis, fotiĝis en amikaj kaj ne formalaj rondoj, du eks-ŝtataj prezidentoj: Stjepan Mesić (Kroatio) kaj Milan Kučan (Slovenio); nunaj kaj iamaj eŭroparlamentanoj: Thomas Jansen- iama

prezidanto de PPE (Germanio), Giorgio Rossetti (Italio), Gianni De Michelis eksa ministro pri eksterlandaj aferoj (Italio), Antonio Cancian (Italio); kaj ankoraŭ universitataj profesoroj: Božo Repe (Slovenio), Mladen Staničić (Kroatio), François Grin (Svislando), Stefano Amadeo (Italio); la prezidanto de la Unesko-Centro de Trieste: Paolo Alessi, kaj fine (sed ne laste) esperantistoj kaj EEU-respondeculoj: Seán Ó Riain (Irlando) kaj Zlatko Tišljar (Kroatio-Slovenio). Sed estis aliaj gravaj kunlaborantoj, kiuj gvidis la laborgrupojn: Linda Maria Ravo, Gordana Vilović, Stefano Amadeo, Miloš Horváth, Stjepan Malović, Vlado Sušac.

La tempo estis tre inteligente dividita: unua sesio: Historia kun prelegoj pri la originoj kaj kialoj de eŭropa unuigo; kiel kaj kial Slovenio eniris Eŭropan Union kaj kiel EU influis la atingon de paco en Nord-Irlando. La dua sesio temis pri Politiko, nome ĉu la Sudorienta Eŭropo havas alian alternativon krom EU (imagi ĝuste en tiuj tagoj daŭre venis informoj el Grekio kie, post la unuaj elektoj malsukcesis unu post la alia la klopodoj havi funkcipovan registaron); kaj tre interesa prezento de la spertoj de plurnacia Ŝtato (iama Jugoslavio) kiel mesaĝo por nuna EU; kaj fine la konstato ke en tiu momento EU troviĝas ĉe decida vojkruciĝo: ĉu integriĝo nur ekonomia aŭ ankaŭ politika? La tria sesio priekzamenis ĝuste la Ekonomion per prelegoj pri la fiska kunordigado necesa por ha sukcesa ekonomia politiko, pri la dinamiko de lingvoj en la tutmondiĝo kaj la rolo de lingva ekonomio en tiu kunteksto, kaj pri la socia solida reco post la traktato de Lisbono. La fina sesio temis pri Homrajtoj: la situacio de handicapitoj en Eŭropo, kun aparta atento al la studentoj, la identeca karaktero de lingvoj, kaj la la eŭropa identeco laŭ religia vidpunkto.

Kronis la tutan aranĝon publika ronda tablo pri la graveco de EU por konservado de la paco en Eŭropo kaj en la mondo, al kiu partoprenis per tre interesaj kontribuoj: Stjepan Mesić, Milan Kučan; Gianni De Michelis kaj Thomas Jansen, sub lerta estrado de Giorgio Rossetti. La urbo, la regiono ne povis preteratenti la konferencon: ĉiutage aperis tutpaĝaj kaj duonpaĝaj artikoloj, intervjuoj kun la gastoj kaj kun la organizantoj, la regiona televido multon filmis kaj multon elsendis, sed m havas nur partan rigardon al tiu flanko, ĉar verŝajne ankaŭ la amaskomunikiloj de la apudaj landoj informis pri tio sed mi ankoraŭ ne havas pri tio sciigojn. Kion diri?



Gratuloj estas memevidentaj, admiro pri la kapablo organizi kaj arigi tiom da gravuloj (eĉ pli ol kelkaj UK!) kaj tio venas ne nur de la partoprenintoj sed ankaŭ de la aŭtoritatoj kiuj donis la patronecon. Jes tio povas ŝajni rutina: la komunumo, la provinco, la regiono, la universitato, jes, vi pravas, sed la fakto ke la Prezidento de la Itala Respubliko – Giorgio Napolitano, havigis al s.ino Ackerman medalon de la Prezidentaro kiel konkreta signo de estimo kaj admiro.... do tio certe ne estas rutina ankaŭ ĉe ne esperantistaj kongresoj kaj konferencoj

okazantaj dise tra Italio.

Bedaŭru pro via ne ĉeesto sed ĝuu havi la eblecon almenaŭ legi la prelegojn, ĉar kompreneble aperos la Aktoj de la Konferenco!

Michela Lipari

## VOĈO DE JUNA PARTOPRENINTO

Inter la partoprenintoj en la Triesta konferenco estis ankaŭ mi. Kio impresis min plej multe? La simultana traduko de la prelegoj kaj de la debatoj fare de tre viglaj kaj kompetentaj homoj inter kiuj estis ankaŭ s-ino Michela Lipari kaj s-ino Cristina De Giorgi. Ne estis facile ilia tasko ĉar temis precipe pri eŭropa historio, politiko kaj ekonomio.



Impresis min ankaŭ la konstanta partopreno de la publiko kiu profitis de la okazo starigi demandojn al la prestiĝaj, informitaj kaj tute sencerimoniaj prelegantoj. Sed la konferenco celis precipe gejunulojn. La knaboj povis esplori kelkajn el la plej dornoplenaj problemoj, kiujn alfrontas ĉiutage la regantoj de Bruselo, enscenigante ilin dum la laboro de la grupoj.

Ekzemple, en simulita gazetara konferenco, iu junulo devis esti la reprezentanto de la Eŭropa Kortumo kaj havis la taskon respondi al la demandoj de iu grupo de gestudentoj pri la verdikto laŭ kiu ne estas diskriminacie postuli ke tiu, kiu deziras esti dungota en la institucioj de Eŭropa Unio, devas esti denaske anglolingvano. La problemo de la lingva hegemonio, fakte, ankoraŭ ne estas konvinke solvita kaj eĉ nun ĝi estas studobjekto pro siaj altaj kostoj kaj sia implicita negado de la plurlingvismo.

Dum la gruplaboro, en kiu mi partoprenis, oni tuŝis la fakton, ke ankoraŭ tute ne ekzistas libro pri la historio de EU. Ĉu la Eŭropa Komisiono ne konscias pri la fakto, ke la generacio de la



nunaj gejunuloj de la 27 membroŝtatoj jam havas la senton de aparteno al EU? Necesus ellabori kaj priskribi objektivan historion pri Eŭrop-Unio kaj ĝis devus esti je dispono de ĉiuj eŭropaj lernejoj. Oni citis similan libron kiu portas la titolon “Historio por Malfermi Estontecon”, Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio aŭspiciita de Ĉina Esperanto-Ligo, Japana Esperanto-Instituto kaj Korea Esperanto-Asocio kaj eldonita de Ĉina Fremdlingva Eldonejo en 2007. Oni sugestis ankaŭ viziti tiucele la monumentojn, en kiuj konserviĝas skribitaj atestoj de homaj sentoj inter la soldatoj de la naciaj armeoj, kiuj estis devigitaj batali unu kontraŭ la alia.

Ĉu la celo de la iniciato, kiu havigis al si la altan patronecon de la Prezidanto Napolitano, estas atingita? Mi opinias ke jes. Estis promociita la partoprenado de la civitanoj en la laboro de la institucioj kiuj koncernas nin de proksime kaj pri kiuj ni ofte tute ne atentis en ilia silenta kaj ŝajne neŝanĝebla ekzisto. La tutmonda krizo demonstris, bedaŭrinde, ke se ni volas esti eŭropanoj, ni devas esti eŭropanoj aktivaj, sen perdi la fidon kaj laborante por transformi burokratan maŝinon kaj la malmolajn leĝojn de la merkato en projekton de politika federacio, kie neniu estas lasota malantaŭe aŭ konsiderota je dua kategorio.



© Vittorio Madella

La konferenco, okazinta en la Salono Beethoven de la eleganta palaco kiu gastigas la sideojn de la triesta Esperanto-grupo, konkludiĝis en ekstreme signifa maniero: ĉiuj ni ekstaris por kanti la Eŭropan himnon per la poeziaj kaj tre sentitaj vortoj de neŭtrala lingvo kiu nenium privilegias kaj kiu konsideras ĉiujn samrangaj.

Alessandra Madella

## NIAJ LANDAJ MOVADOJ ESPERANTO EN BULGARIO

Observante la historion de la E- movado en Bulgraio oni povus konstati, ke ĝi estas inter la plej malnovaj landaj movadoj kaj faris la unuajn paŝojn tuj post la apero de la unua lernolibro de la internacia lingvo Esperanto, gajninte multajn entuziasmajn adeptojn en la lando. Ĝi aperis dum 1888-a jaro. Per sia modela, senlaca laboro la unuaj veteranoj de la E- movado en Bulgario: Miroslav Bogdanov, Hristo Popov, Georgi Oreŝkov k.a. edukis multajn fidelajn batalantojn, kies agado por Esperanto donis tiajn rezultojn, ke nun Bulgario estas unu el la landoj kun bone organizita E-movado.

La komenca agado pri Esperanto en Bulgario estis farita de d-ro Miroslav Bogdanov, kiu insiste kaj tre lerte utiligis la ĝeneralan gazetaron por publikigi en ĝi propagandajn artikolojn pri Esperanto. Samtempe li preparis lernolibron por bulgaroj kaj eldonis ĝin dum 1889-a jaro. Krome li fondis en Sofio la kvaran laŭvice en la mondo Esperanto-klubon, post tiuj en Nurnbergo, Petrogrado kaj Moskvo. Li iniciatis ankaŭ la eldonadon de dulingva revuo "Mondlingvisto", kiu estis la dua en la mondo E-revuo tuj post "La Esperatisto" en Nurnbergo. La dua laŭvice bulgara E- klubo fondiĝis en urbo Veliko Tarnovo kaj nomiĝis "Flamo". Ĝi komencis eldonadon de propra revuo "Lumo" kaj fariĝis inicianto por fondo de tutlanda E-organizaĵo. Inter la unuaj esperantistoj en la urbo estis la granda bulgara verkisto, klerikulo kaj sociaganto Vasil Drumev, mitropolito Kliment.

Post V. Tarnovo estis fonditaj E-klubo en Plovdiv, Kazanlak, Ruse, Karlovo, Stara Zagora, Pazarĝik k.a. urboj en Bulgario.



La 18-an de aŭgusto 1907 en Veliko Tarnovo okazis la 1-a tutlanda Kongreso kaj estis fondita Bulgara E- Ligo. La Kongreson partoprenis 26 oficiale rajtigitaj delegitoj el 14 lokaj E-organizoj kaj multaj gastoj el proksimaj kaj malproksimaj lokoj, kie ekzistis ankoraŭ neorganizitaj esperantistoj. D-ro L.L. Zamenhof estis elektita kiel honora prezidanto de la Bulgara E- Ligo. Oni sendis al li telegramon: "La unua bulgara E-Kongreso kunsidanta en

Veliko Tarnovo sendas sian gratulon al Vi, estimata Majstro! Vivu Vi por la feliĉo de la homaro! De la Kongresa Estraro". Krom tio oni sciigis al d-ro L.L. Zamenhof ke li estas elektita kiel honora prezidanto de la Bulgara Esperantista Ligo. Zamenhof respondis per letero "Al Bulgara Esperantista Ligo mi sendas koran saluton kaj deziron de la plej bonaj sukcesoj. La titolon de honora prezidanto mi danke akceptas. Via Zamenhof. 24.10.1907" Tuj post la fondiĝo de BEL komenciĝis aktiva agado en la lando por popularigo de Esperanto kaj fondo de lokaj E- kluboj. La movado establiĝis paŝon post paŝo. En Sofio estis fonditaj Studenta E- grupo kaj Gelernanta E-Ligo en kiuj spertiĝis kapablaj esperantistoj, estontaj asociaj gvidantoj kiel ekzemple Atanas D. Atanasov-ADA, kiu verkis la plej bonan lernolibron de Esperanto por bulgaroj, Ivan H.Krestanov kiu kompilis "Antologion de la bulgara prozo kaj poezio", Nikola Aleksiev, Hristo Gorov, Violin Oljanov, Ivan Sarafov, Asen Grigorov k.a. eminentaj esperantistoj, konataj ne nur inter la bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ al la monda esperantistaro. Grava merito de la Studenta E-grupo estis la altiro por subteno de Esperanto fare de elstaraj bulgaraj sciencistoj. Iuj el ili eĉ estis malamikoj de Esperanto, sed konatiĝinte kun ĝi ili transformiĝis en aŭtoritatajn adeptojn de la internacia lingvo. La popular en Bulgario prof. d-ro Ivan D. Ŝiŝmanov eĉ faris publikan prelegon en la

Universitato je la temo: "Ĉu estas ebla internacia helplingvo?" (1912). La prelego aperis en kelkaj eldonoj kaj konservas sian valoron ĝis hodiaŭ.

Dum 1912 Bulgara E-Ligo (BEL) reorganizigis akceptante la nomon Bulgara E-Societo kaj ek de 1928 estiĝis Bulgara E-Asocio (BEA).

Kiel la internacia, tiel ankaŭ la bulgara E-movado konas periodojn de konsiderindaj sukcesoj, sed tamen same periodojn de regreso kaj krizo.



Kiel regreso kaj krizo oni povus mencii la periodon de 1939-1955 j.

Poste komenciĝis la renovigo de la E-movado en Bulgario. Gravan rolon por popularigo de Esperanto havis E-gazetaro eldonita en Bulgario: «Bulgara esperantisto», »Nuntempa Bulgario«, «Ripozoj en Bulgario«, «Paco», «Scienca mondo«. En 1958-a jaro estis fondita Bulgara E-teatro kies spektakloj estas konataj al la esperantistaro. Denove estis organizita fakultativa instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj. En kelkaj bulgaraj Universitatoj estis organizita ankaŭ la fakultativa instruado de Esperanto. Elkreskis novaj talentaj originalaj aŭtoroj kaj tradukistoj kiel Georgi Mihalkov/Julian Modest, Venelin Mitev, Georgi Idakiev, Penka Papazova, Nikolaj Uzunov k.a, kiuj vice kun siaj malnovaj kolegoj Hristo Gorov, Violin Oljanov, Canko Murgin k.a estiĝis konataj al la monda esperantistaro. En Pisanica estis konstruita kaj funkciis ĝis la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento la konata por la esperantistaro Internacia E-Kursejo. En 1956 kelkpersona grupo de esperantistoj: Cv. Cvetkov, M. Dančev, Iv. Bataklijev, L. Gajdarov. N. Ganev, B. Leonov, N. Arnaudov k.a kolektiĝis en la rozĝardenoj ĉe Karlovo fondinte la "Feston de la rozo". Unue tio estis nur tradicia E-aranĝo, sed poste la ŝtato proklamis ĝin "Nacia festo de la rozoj" kaj Folkloro festivalo kun partopreno de folkloraj ensembloj kaj estiĝis amase vizitinda Festo de bulgaraj kaj eksterlandaj gastoj.

En Bulgario estis organizitaj Universalaj Kongresoj de Esperanto: en Sofio 1963 kaj en Varna 1978, TEJO-Kongresoj en Vraca 1963 kaj en V. Tarnovo 1978, renkontiĝoj de la esperantistoj loĝantaj en la balkanaj landoj, seminarioj k.a. naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj.



Al la evoluo de la E-movado en Bulgario dum la 60-aj kaj 70-a jaroj de la pasinta jarcento kontribuis la aktiva agado de Bulgara E-Junularo (BEJ), ĉefe la agado de la studenta E-societo “Vela Peeva” en Sofio. Post la elekto de Bojidar Leonov kiel Prezidanto de Studenta Tutmonda E-Ligo (STELO) li organizis kaj gvidis la Internaciajn E-Laborbrigadojn en Bulgario. La funkciuloj de la junulara E-movado P. Todorov, N. Uzunov, B. Leonov, D. Ĵdrakov k.a. iniciatis kaj organizis la Naciajn junularajn E-Festivalojn, kiuj ĝis la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento estis tradiciaj regule organizitaj kulturaj E-aranĝoj.

Malgraŭ la problemoj kunligitaj kun la monda financa krizo kaj la malbona financa stato de la bulgara popolo, BEA daŭre strebas aktivigi sian agadon, organizante E-kursojn en lokaj E-societoj, organizante diversajn E-aranĝojn kunlaborante kun neesperantistaj fakaj kaj sociaj organizaĵoj. Aktiva estas la agado de la E-societoj en Razgrad, Karlovo, Galabovo, Pazarĝik, Velingrad, Plovdiv k.a. Tradiciaj jam estiĝis EKRA en Razgrad, AEPA en Karlovo k.a. E-aranĝoj kaj renkontiĝoj.



Bona estas la kunlaboro de BEA kun AIS-San Marino, ILEI, ISAE, IFEF, SAT k.a. Asocia membro de UEA. Kune kun Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista-TOLE, kies sidejo estas en Karlovo, IKUE, KELI estis organizitaj ekumenaj E-aranĝoj - la religiaj seminarioj: “La religio kontraŭ la terorismo kaj militoj”, “La rolo de la religio por evoluo de la homa kulturo kaj civilizacio”,

“La rolo de religio por la edukado de la juna generacio“. La seminariojn partoprenis reprezentantoj de la bazaj religioj en la mondo: kristana, muzulmana kaj budhisma. La reprezentantoj de la diversaj religioj prezentis antaŭ la oficialaj instancoj en Bulgario, ke sendepende de sia religia apartaneco, ĉiuj kreduloj agas kontraŭ la terorismo, militoj kaj ĉiuj religioj kontribuis por la evoluo de homa kulturo, civilizacio, eduko de juna generacio obei la noblajn principojn de la religia etiko kaj moralo.

Dum jardekoj estas la kunlaboro de E-societo Karlovo kun la neesperantista scienc-teknika asocio en Bulgario (STA) kaj Domo de Tekniko Karlovo, kie funkcias Internacia E-Centro por patent—scienc-teknika informado kaj patentaj esploroj. La regiona Estraro en Karlovo de STA akceptis Esperanton kiel oficiala kontaktlingvo en la fakaj kontaktoj inter la fakuloj. La kunlaboro de BEA kun AIS-San Marino realiĝas per la komuna agado kun AIS-Bulgario, kies sidejo estas en Karlovo. Ekde 2001 en Karlovo funkcias Internacia Universitato Karlovo - AIS Klerigejo, kies oficiala studadlingvo estas Esperanto. En la komenco de 2011-a jaro ĝi ricevis ŝtatan licencon de Nacia Agentejo por profesia edukado: Internacia E-Centro por profesia edukado “ESPERINFORM” Karlovo, kies oficialaj studadlingvoj estas Esperanto kaj bulgara lingvo kaj kies studentoj, post la fino de sia studado uzonte Esperanton kiel studadlingvo, rajtas ricevi por 10 profesiaj fakoj dokumentojn agnoskeblajn en ĉiuj landoj de EU.

Post la 62-a BEA-Kongreso en Sopot 2010 estiĝis kiel bazaj prioritatoj en la programo por la agado de BEA:

- aktiviĝo de la rektaj kontaktoj kun LA kaj FA de UEA
  - aliĝo de BEA al EEU
  - aktiviĝo de la instrua agado organizante E-kursojn por la loĝantaro, lernantoj, studentoj
  - subteno al la agadon de Internacia Universitato Karlovo kaj Internacia E-Centro por profesia edukado
  - kunlaboro kun FA de UEA, AIS- Bulgario, kaj neesperantistaj fakaj organizaĵoj por praktika apliko de Esperanto en la profesia kaj socia agado
  - kontaktoj kun Radio, TV kaj gazetaro por propagando de Esperanto
  - aktiviĝo de junulara E-agado
  - renovigo la organizado de la Festivaloj por E-kanto, recitado kaj oratoraj konkursoj
  - renovigo de la agado en urboj, kie estis E-societoj por krei novajn E-societojn
- Tuj post la Kongreso la Estraro de BEA komencis realigi la agadon surbaze de la akceptitaj prioritatoj.



Ekde 2012-a jaro BEA jam estas membro de la granda europa familio aliĝinte al EEU. En 2011 en Karlovo okazis la I-a Internacia Festivalo de E-kanto, recitado kaj oratora konkurso. En 2012 okazis la II-a Festivalo. La Festivalojn partorenis bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. Tiamaniere post pli ol 30 jaroj estis

renovigita la tradicio de la iama junulara E- movado en Bulgario.

Grava prioritato en la agado de BEA estas la praktika apliko de Esperanto en la profesia kaj socia agado. Jam dum 3 jaroj BEA, kune kun AIS- Bulgario, Internacia Universitato Karlovo, Scienc-teknika Asocio en Bulgario organizas la Internaciajn simpoziojn «Apliko de Esperanto en la profesia agado» AEPA. La simpoziojn partoprenis eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj profesoroj, scienculoj, fakuloj pri diversaj profesiaj fakoj, reprezentantoj de Bulgara Akademio de la sciencoj, Scienc-teknika Asocio en Bulgario, universitatoj, pluraj oficialaj instancoj en Bulgario, TV, radio, gazetaro. La simpozioj estis organizitaj de la esperantistoj, sed dediĉitaj ankaŭ por la fakuloj, kiuj ne estas esperantistoj, ĉar oficiala lingvo estas Esperanto, sed laborlingvo – la nacia lingvo de ĉiu partopreninto, kiu ne estas esperantisto, sed kun la certigita rekta traduko nacia lingvo-Esperanto-nacia lingvo povus prelegi, partopreni la diskutojn, profesiajn kontaktojn kun samfakuloj. Tiamaniere la simpozioj plenumis sian bazan celon - prezenti al la oficialaj instancoj, ke Esperanto ne estas nur lingvo por amikaj kontaktoj, babilado kun geamikoj dum la internaciaj E-aranĝoj, sed povas esti kaj devas esti aplikota kiel oficiala kontaktlingvo en la fakaj seminarioj, profesiaj kontaktoj inter la monda fakularo!

Per sia modesta agado BEA kontribuas por la prospero de la internacia E- movado.

prof. Boĵidar Leonov, prezidanto de BEA



## JARO DE TIBOR SEKELJ RONDA TABLO PRI TIBOR SEKELJ EN SUBOTICA



De la 18-a ĝis la 20-a de majo okazis en Subotica (Serbio) RondaTablo „Vivo kaj verko de Tibor Sekelj“ - Dum la aranĝo prelegis pri diversaj aspektoj de la temo 14 prelegantoj kaj tri prelegoj de neĉeestantoj estis legitaj. En la aranĝo partoprenis trideko da partoprenantoj el Serbio, Hungario, Slovakio, Kroatio, Slovenio kaj Bosnio-Hercegovino. La

Rondan Tablon aŭspiciis la urbestro sinjoro Saša Vučinić.

La prelegoj prilumis la vivon de Tibor Sekelj el multaj aspektoj: La vivo kaj agado, neordinara vojaĝanto, biografio, vivfilozofio, literaturo, rolo en strategio de la E-movado, universalismo, postlasitaj spuroj en Argentino kaj Kostariko, Sekelj en muzeoj de Spišska Sobota kaj Subotica, rolo en difino de geografiaj terminoj, Sekelj en Beograda televido, la ĉiama semanto....



Eble la plej trafan difinon pri Sekelj prezentis Judita Rey Hudeček el Kroatio difinante lin NIA TIBOR. Pro la fakto ke Sekelj vere apartenis al la tuta mondo kaj malfacile oni povas ligi lin forte al iu ajn lando (li ja naskiĝis en Slovakio, laŭ gepatroj estis hungaro, edukiĝis kaj studis en eksa Jugoslavio kaj poste vivis kaj esploris multajn partojn de la mondo) oni povas nur miri kiom profundajn spurojn li lasis en multaj landoj ĉar

oni konsideras lin NIA Tibor same en Slovakio, kiel en Hungario, Kroatio, Serbio, Argentino, Nepalo, Meksikio, Bolivio....

La libro kun ĉiuj prezentitaj referaĵoj estos sendube grava dokumento por kontribui al la prilumo de tiu grandulo, kvankam la Ronda Tablo konstatis, ke ĉio kion ni faris estis nur ekgrato en la esploro pri lia vivo. Ĉiu ekkono pri li postulas novajn kaj novajn pliajn esplorojn kaj por bone pristudi iun ajn el la kampoj oni bezonas jarojn da esploroj.



Dum la libertempaj diskutoj la partoprenantoj proponis al la organizanta E-societo de Subotica ekde nun daŭre ĉiujare organizi tagojn de Tibor Sekelj kaj krei el Tibor simbolon de Subotica.

Krom la Ronda Tablo okazis jenaj pliaj aranĝoj: La duan tagon en la solena salono de la belega urbodomo okazis riĉa kulturprogramo en tri lingvoj (hungara, serba kaj Esperanto) en kiu koruso kantis kanzonojn, pianludistino prezentis pianmuzikaĵojn, oni deklamis poeziaĵojn, estis prezentataj solenparoloj. Digna kaj bela omaĝo. Apartaj programoj estis vizito de la tombo de Tibor kun surmeto de girlandoj kaj malkovro de memortabulo sur la domo kie Sekelj vivis, meze de la urbo.



Estis krome malfermita ekspozicio pri Sekelj en urba biblioteko kaj ekspozicio de fotoj pri pupoj el Pupteatra Internacia Festivalo kiun li iniciatis en Zagrebo. Aparte grava estis apero de la libro en 5 lingvoj (serba, Esperanto, hungara, angla kaj kroata) „Tibor Sekelj“ kun multaj artikoloj kaj fotoj pri li kaj eksponaĵoj el lia kolekto de maskoj, instrumentoj kaj ĉapoĵoj. La aranĝon partoprenis ankaŭ lia edzino Erzsebet Sekely kaj oni legis ankaŭ salutleteron de

lia filo Daniel Bernstein.

La renkontiĝo estis bonega okazo por multaj interparoloj de la partoprenantoj. La dommastro: E-societo el Subotica portanta la nomon de Tibor Sekelj kaj la urbo Subotica tre bone organizis ĉion kaj meritas grandan dankon por eksterordinara gastameco.

Zlatko Tišljar

## **SVISIO PRI TIBOR KAJ INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI**

Svisa Esperanto-Societo havis la ĝeneralan asembleon. Mi aludis al Tibor Sekelj kaj mallonge prezentis lin. Jen parto de la protokolo de la asemblea kunsido:

»2012 estas memoriga jaro de Tibor Sekelj: vojaĝisto el la tiutempa aŭstra hungara imperio. Li vojaĝis, verkis en la hispana, serbokroata kaj en Esperanto en belega stilo.«

Alia loko por memori pri Tibor Sekelj: Mi nun preparas la testojn de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA por Kunming. Mi devas elekti tekstojn por aŭskulta kompreno kaj lega kompreno. Mi prenis kaj por la elementa nivelo kaj por la meza nivelo parton de la unua ĉapitro de Ghambo Rafiki: mirinda teksto "Kial ĝuste al Afriko" kun tiu priskribo de la graveco de konsidero de individuo. Multaj nuntempaj esperantistoj devus relegi ĝin dekfoje.

Mireille Gosjean

## EN KROATIO PLIA ARANĜO OMAĜE AL TIBOR

La 26-an de majo okazis en Hrašćina norde de Zagrebo aranĝo dediĉita al Tibor Sekelj kiun organizis Spomenka Ŝtimec. Prezentiĝis ekspozicieto de la libroj de Sekelj kaj programo en kiu pri li parolis Spomenka Ŝtimec kaj Zlatko Tišljar. En kultura programo Neven Mrzlečki kantis elektitajn kantojn el Sudameriko. Menciindas ke inter kvindeko da ĉeestantoj ĉeestis ankaŭ la prezidantino de la regiono (Županija Krapinsko-Zagorska), sinjorino Sonja Borovčak.

Maja Tišljar

## EKSPOZICIO KAJ SIMPOZIO EN BAVARA ŜTATA BIBLIOTEKO

Okaze de la 100a datreveno de la morto de prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912), la aŭtoro de Volapük, kaj la 125-jara ekzisto de Esperanto Bavara Ŝtata Biblioteko (BŜB) en Munkeno aranĝos ekspozicion sub la titolo *INTER UTOPIO KAJ REALO. Konstruitaj lingvoj en globalizita mondo*. BŜB apartenas al la plej grandaj universalaj bibliotekoj de la mondo: ĝi posedas unu el la la plej riĉaj plan-lingvaj sortimentoj.

La solena malfermo de la ekspozicio okazos **ĵaŭdon, la 14an de junio 2012, je la 19-a horo** en la biblioteko (Ludwigstr. 16, D-80539 München, Germanujo) far D-ro Rolf Griebel, ĝenerala direktoro de BŜB. La biblioteka koruso prezentos kantojn en Volapük kaj Esperanto. Enkonduka referato pritraktos la temon „Kio estas kaj kiu-cele oni okupiĝas pri interlingvistiko?“

**Vendredon, la 15an de junio**, okazos tuttaga simpozio kun prelegoj de Prof. D-ro Heiner EICHNER, Universitato de Vieno, Reinhard HAUPENTHAL, iama instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko, Universitato de Sarlando, D-ro Ulrich LINS, historiisto, Bad Godesberg, Mag. Herbert MAYER, gvidanto de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-Muzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Prof. D-ro Gerhard F. STRASSER, Pennsylvania State University, Ludwig-Maximilian-Universitato, Munkeno.

La prelegoj aperos libroforme en volumo akompananta la ekspozicion (prezo: ĉ. 20,-- €). Aliĝoj okazu jene:

- 1) por la solena malfermo: [veranstaltungen@bsb-muenchen.de](mailto:veranstaltungen@bsb-muenchen.de)
- 2) por la simpozio: [baes.sekretariat@bsb-muenchen.de](mailto:baes.sekretariat@bsb-muenchen.de) .

En la reto samtempe okazos virtuala ekspozicio.

Detaloj en la germana kaj en Esperanto:

<http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M562baccbf1d.0.html>

Detaloj en la angla:

<http://www.bsb-muenchen.de/Detailed-information.403+M55ef4ef2898.0.html>

Renato Corsetti

## PROGRAMOJ DE KVINPETALO

Ĉu vi ŝatas esperantan amikan etoson? ĉu vi ŝatas trankvilan kaj agrablan kamparon? ĉu vi ŝatas praktiki la lingvon kaj kleriĝi pri diversaj temoj? Eble vi ne konas Kvinpetalon? Temas pri esperantista kulturcentro en la vilaĝo Bouresse, en sudokcidenta Francio, je 40 km de Poitiers. Bela regiono, kun multaj turismaĵoj.

La kulturcentro Kvinpetalo proponas al vi buntan oferton, por ĉiuj gustoj kaj ĉiuj niveloj.

Ĉiuj staĝoj estas gvidataj de profesiuloj.

Ĝi ankoraŭ ne estas en la programo sed ni antaŭvidas ankaŭ staĝon por trejni instruistojn.

Bonvenon en Kvinpetalo!



LA PROGRAMO:

20a-28a de julio **Muzika Staĝo kun Markov-familianoj**

28a de julio-4a de aŭgusto  
**Praktikado de la lingvo (1a kaj 2a nivelo) kun Lala Ralalarisoa kaj Carlo Bourlot**  
(el Madagaskaro kaj Italio)

25a-29a de oktobro  
**Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj kun Michel Dechy**

2a-4a de novembro **Provludo**

**de Interkant' pri Karmen' (apartaj aliĝkondiĉoj)**

**Informoj ĉe KVINPETALO Esperanto-Centro**

<http://www.kvinpetalo.org/spip.php?article37> (esperante)

<http://www.kvinpetalo.org/spip.php?article38> (france)

ret-adreso: [informoj @ kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

Claude Nourmont

## ESPERANTO EN ARTE-TELEVIDO

La 8-an de majo la franc-germana televido ARTE intervjuis min ĉe Berlaymont pri la himna iniciato. ARTE elsendis tiusence raportaĵeton la 9-an de majo, okaze de la Tago de Eŭropo kaj en la germana kaj en la franca. Bedaŭrinde ili ne elsendis la intervjuon sed nur mian kantadon de la himno. Mi substrekis ke mi ne estas kantisto, sed ke mi konsentas kanti "kiel civitano". Ambaŭ ĵurnalistoj ŝajnis rilati ege pozitive al nia propono.

Pozitive estas:

- 1) ke ili entute montris tiun mallongan raportaĵon al tiel grandega rigardantaro;
- 2) ke ili montris ĝin je la plej konvena horo, kaj france kaj germane;
- 3) ke ili substrekas ke ĝi ne estas komerca;
- 4) ke ili diris ke temas pri "la a plej eŭropa el la ideoj";



- 5) ke ili montris klare la imponan enciklopedion de originala literaturo en Esperanto, kiu efike detruas la argumentojn de la stranguloj kiuj parolas pri "lingvo sen kulturo";
- 6) ke ili montris la karton pri la gramatiko de Esperanto.

Seán Ó Riain

## EDE-PL EN POLA SENATO

La 9-an de majo 2012 dum pli ol unu horo okazis renkonto en la senatejo de Pola Parlamento kun vicmarŝalo Wyrowinski, senatoro Ryszard Gorecki - prezidanto de Pol-Japana Senatana Grupo, senatoro Edmund Wittbrodt - prezidanto de Senatana Europa Komisiono, senatoro Kazimierz Kleina, senatoro Stanislaw Iwan, senatoro Waldemar Kraska kaj sekretario de Pol-Japana Grupo - Joanna Banasikowa.

La honoraj gastoj estis el Japanio Etsuo Miyoshi kaj lia sekretario Atilio Orellana Rojas. Flanke de Eŭropo-Demokratio-Esperanto partoprenis Edward Kozyra - viceprezidanto de EDE-pl, Stanislaw Rynduch - sekretario de EDE-Federacio, Jerzy Antinio Walaszek - vicesekretario de EDE-Federacio, Kazimierz Krzyzak - ano de EDE-estraro kaj politika organizanto, kaj administranto de la EDE-pl - portalo; [www.ede.esperanto.info.pl](http://www.ede.esperanto.info.pl) kaj ano de EDE-pl, Adam Budzynski.

La kunvenon malfermis la Sejm-marŝalo kaj mallongan enkondukon faris senatoro Edmund Wittbrodt.



Stanislaw Rynduch

Parolis ankaŭ rektoro Ryszard Gorecki, tiam prelegis Etsuo Miyoshi. En la diskuto partoprenis Stanislaw Rynduch, Edward Kozyra, Antonio Walaszek. La fotan servon prizorgis la administranto de la portalo EDE-pl.

La senatoroj volonte kaj pozitive esprimis sin pri Esperanto kaj deklaris helpon de la sanat-parlamenta grupo por promocii Esperanton.

Ĉe la fino la marŝalo enmanigis al Etsuo Miyoshi pro disvastigo de pola kulturo kaj Esperanto, senatan medalon.

La marŝalo promesis, ke la informo aperos en la interreto en la paĝaro de la senatejo. Ankaŭ estis propono organizi en la senatejo E-ekspozicion.

## GIGANTOJ KAJ MUELEJOJ



En la ĉarma urbeto Almagro disvolviĝis de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo la 71-a Hispana Kongreso de Esperanto. La kongresurbo havas malpli ol dek mil loĝantoj kaj estas tre vizitinda loko. Ĝi multe prosperis dum la 17-a jarcento sub la influo de la bankista germana familio Fugger (ili estis nomataj «los Fúcares» en la hispana) dum la regado de la imperiestro Karolo la 5-a. Restas pluraj tiuepokaj konstruaĵoj kaj inter ili elstaras la Plaza Mayor (Ĉefa Placo) kun verdaj

duetaĝaj domoj, la Almacén de Fúcares (magazeno konstruita por stoki grajnoj kaj ĉefe hidrargon el la proksimaj minejoj de Almadén), la monaĥejo Convento de la Asunción de las Monjas Calatravas aŭ la Palacio de la Grafoj de Valparaíso, centra ejo de la kongreso konstruita en la jaro 1699.



Aparte belas la Corral de Comedias aŭ teatrokorto, sentegmenta teatrejo de la 17-a jarcento, kiu konserviĝas sensanĝe. Nur la vestaĵoj, hararanĝoj kaj la fotiloj de la ĉeestantaro –krom la fakto, ke multaj el ili babilis esperante kaj ne en la cervantesa lingvo– klarigis ke ni jam vivas en la 21-a jarcento.

Dum la kongreso, Alejandro Pareja gvidis la kutimajn lingvajn kursojn por komencantoj kaj Jorge Camacho rolis kiel

lerta interpretisto dum la vizito en Almagro aŭ dum la ekskurso al la muelejoj (nur gigantojn vidis kiĥoteska granada verkisto el la Ibera Skolo Miguel Fernández) en Campo de Criptana; kelkaj ventmuelejoj el la 17-a jarcento ankoraŭ povus ekfunkcii nun.



Post la unua sperto en la pasintjara hispana kongreso en San Lorenzo de El Escorial, denove oni peĉakuĉis pri diversaj aferoj en Almagro. Espereble oni baldaŭ enretigos tiujn etajn prezentadojn.

Ne nur la pli ludemaj kongresanoj ĝuis la prezentadon de *Talismanoj*, kartludo kreita de la plurvizaĝa verkisto Abel Montagut ĉirkaŭ «Don Quijote kaj verdaj Donkiĥotoj»

Inter la artaj agadoj, krom la projekciado de filmoj pri esperanto, oni devas elstarigi la teatrospektaklon *Vivu la Teatro*, prezentita de Ana Manero kaj Miguel Fernández kaj kun la

partopreno de dekduo da esperantistoj kaj de loka aktorino kiu bonege rolis en fragmento de *Sanga nupto* de Federico García Lorca (esperantigita de Miguel Fernández).



Lundon la tre simpatia loka kanzonisto Alejandro Cerro rolis kiel agrabla «aperitivo» por la koncerto de Kaj Tiel Plu. La kataluna grupo ludis plurajn tradiciajn okcitanajn kaj sefardajn kantojn esperantigitaj de ili kaj, kiel kutime, ankaŭ popolkantojn de la Hispana Enlanda Milito kiel *En la fronto de Gandesa*.

La kongreso omaĝis la Iberan Skolon okaze de ĝia 20-jara datreveno kaj ĝuis la partoprenadon de Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez Adúriz, Jorge Camacho, Abel Montagut kaj «ilia muzo» Ana Manero.

Mardon matene, Ana Manero prezentis la novajn atingojn kaj celojn de la Bitoteko, fierinda projekto de HEF malfermita al la tuta esperantistaro. La Bitoteko celas disponigi rete librojn kaj gazetojn en aŭ pri esperanto kiuj estas nun publika havaĵo (ekster aŭtor-raĵtoj) kaj fari tion laŭ profesia formo el bibliografia vidpunkto. Bitoteko antaŭ nelonge pligrandigis ĝian videblecon danke al la eniro en Hispana kaj celas «plenumi certajn kondiĉojn pri specifaj metadatenoj» por esti baldaŭ serĉebla ankaŭ pere de Europeana.

Krom la prelegantoj kaj respondeculoj de la programeroj jam menciitaj, la kongreso sukcesis danke al la prizorgoj de Jesús García Cano, Raúl Martínez Anguita kaj aliaj membroj de la Loka Kongresa Komitato kaj de la senlaca prezidanto de HEF Toño del Barrio. Kaj kompreneble ankaŭ danke al la centoj da partoprenintoj, de la sepjaraĝa ĉarma denaskulino kiu vigligegis la lasttagan aŭkcion ĝis Eduardo Larrouy, naŭdeknaŭjaraĝa junulo el Bilbo, esperantisto de okdek jaroj.

Javier Guerrero

## STAĜO ĈE E@I

Somero proksimiĝas kaj E@I havas denove okazon gastigi kelkajn staĝantojn.

Ĉar ĉi tiu mesaĝo senditas al la dissendolisto pri informado, mi aldonu, ke ni volonte akceptus ĉi-somere ĝuste studentojn, kiuj povus esti tre utilaj rilate al nia priinformada laboro - se do vi studas: ĵurnalismen, aspektigadon, programadon, interkulturon, internaciajn rilatojn ktp., vi estus tre bonvena, ĉar ĝuste nun ni pretigas kelkajn projektojn, kiuj rilatas al la informado pri Esperanto. Jen do kelkaj detaloj sube:



Ĉu vi studas ĉe universitato en EU, EEA, Svisio aŭ Turkio pri informadiko, konaj sciencoj, lingvistiko, pedagogio, ĵurnalismo, ekonomio, arto aŭ alia fako?

- gajnu monon,
- ricevu studpoentojn,
- akiru sperton,
- vivu eksterlande,
- lernu novan lingvon,
- kaj helpu al Esperanto!

Nuntempe ni serĉas studentojn-esperantistojn, kiuj ŝatus kadre de sia studo pasigi 3 ĝis 12 monatojn laborante por E@I (ĉu en la oficejo en Slovakio, ĉu el eksterlando). Plenigi la formularojn postulas nur malmultan laboron, ŝanco gajni la stipendion estas sufiĉe granda. La stipendio estas inter 300 kaj 1000 € monate

Por ĉi-somero verŝajne jam venos 2 staĝantinoj, ni povas tamen ankoraŭ akcepti 1-2 personojn, volonte do kontaktu nin, se vi interesiĝas.

Jen pli da detaloj pri la staĝo: <http://blogu.ikso.net/2012/03/farigu-staganto-de-ei/>

Peter Baláž (Petro) - [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net)  
E@I-kunordiganto

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de majo 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Michela Lipari, Alessandra Madella, Boĵidar Leonov, Mireille Grosjean, Maja Tišljár, Renato Corsetti, Claude Nourmont, Javier Guerrero, Petro Baláž

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

